



# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 5 Majo, 2013



*Altestimataj legantoj, ni, la redakcio, tute ŝanĝis la enhavon de nia maja bulteno pro la ege malgaja novaĵo: forpasis koro, simbolo, motoro de nia E-societo, multjara akcelerantino de la E-movado en Ŝikago, Illinojsio kaj Usono, karmemora Gertrude Novak, MD. Pardonu, ni funebras...*

*Aliaj materialoj, aperintaj en ĉi numero nur substrekas, ke nia afero ne malaperos, ke ĝi (Esperanto) vivos eterne, ĉu ni pravas?*  
—La Redakcio

## Omaĝe al Karmemora GERTRUDE NOVAK (1920-2013)

Dr-ino Gertrude Novak, naskita en 1920, forpasis en Ĉikago la 21an de Majo 2013. Ŝi estis medicina patologo, edukinta plurajn generaciojn de kuracistoj. Dum multaj jaroj ŝi laboris por Rush Medicina Universitato kaj laste – en Stroger Hospitalo en Ĉikago. Ŝi estis senlaca volontulo kiu aktivis en multaj kampoj. Kiel esperantistino, filino de la fama E-isto Novcak (Aŭstrio), flua en Esperanto, ŝi vigle agadis en la movado. Ŝi vojaĝis tutmonde por amikiĝi kun ĉiuj, i.a. en Afriko kaj Sudameriko. Ŝi estis plurjara Delegito de UEA; prezidantino (1994-1996) kaj sekretario (2006-nun) de la Esperanto-Societo de Ŝikago.



### Ni Funebras...

Lastmonate D-rino Novak pertelefone petegis min helpi ŝin veni al la aprila kunveno de nia E-Societo en la biblioteko, kvazaŭ ŝi estis konscia pri sia lasta E-kunveno. Ŝi nepre volis partopreni. Dumvoje ŝi konfesis al mi la faktojn pri ŝia senespera kondiĉo. Kvankam jam en rulseĝo ŝi vigle sekvis niajn konversaciojn. Ni tamen devis kurtigi la kunvenon kaj urĝe retransporti la doktorinon hejmen pro ŝia troa laciĝo.

La lastan fojon mi vidis ŝin nur kelkajn horojn antaŭ ŝia forpaso, kiam mi vizitis ŝin en la malsanulejo. Mi vidis ŝin kviete kuŝanta sur la lito, jam ne plu ebla komunikiĝi. Mi adiaŭis ŝin nome de ĉiuj esperantistaj geamikoj.  
—D-ro L. Kordylewski, Prezidanto



Ŝi estis nekredibla virino. Mi bedaŭras la perdon de ŝi. Mi havas afablajn memorojn de viziti Ĉikago kaj resti ĉe ŝia hejmo, kaj iri al la Ŝikaga Esperanto-klubo kun ŝi. Mankos al ni.

—Elizabeth Dorcas



Kia malbona novaĵo! Tamen ŝi spertis longan bonan vivon. Mi konis ŝin dum multaj jaroj: d-ino Novak estis tre afabla helpema amikino de multaj Esperantistoj tra la tuta mondo. Ŝi ĉiam estis preta aŭdi pri la problemoj

de aliuloj kaj provizi bonan konsilon al ili. Ŝi estis tre humila. Kiam oni renkontus ŝin, oni tute ne povis diveni, ke ŝi estas profesia kuracisto, sed ĉiuj sciis, ke ŝi estas Esperantist(in)o. Ŝia morto estas tre malĝoja afero por multaj homoj.

—Ron Glossop



Gertrude was one of the first people I met when I joined the Chicago Esperanto Association. I could see even on the first day that she was a strong proponent of Esperanto while also being open and friendly to newcomers. She could help a person improve their Esperanto without acting like a strict school teacher, and this easy nature was one of her endearing qualities. It was also apparent that she had a love of travel, and over the years she had the chance to meet with many Esperantists in their home countries. She always brought back pictures and stories to share with her Esperantist friends in Chicago. Over the years Gertrude—we called her “Doktorino”—was a stable presence in our association. Now the face and personality of our club has changed, and we will miss Gertrude’s optimism about life and her enthusiasm for our shared tongue.

—Robert Stalzer, Prezidinto

Gertrude was a lead instructor with Cook County Hospital's Physician's Assistant program for 40 years, which was the only PA program in the State. In 1994, the program was adopted by City Colleges of Chicago, and specifically Malcolm X College. She continued teaching classes until two years ago. She also traveled across the country and worldwide as a volunteer medical consultant. She was also a faithful lifelong member of the Catholic Church. I think of Gertrude as the 'mom' of Esperanto Society of Chicago. She liked to take pictures at all events and then share them. She was always very kind and hard working. She would call me "Chuck" as a term of endearment, and she always asked about my family with love. —Karlo, Kasisto



Kiam nia prezidanto d-ro Leszek informis pri la forpaso de nia sekretario d-ino Gertrude, mi tuj iris al nia e-bulteno "Saluton!" (kredu al mi, mi unuafoje ekkomprenis utilecon de la eldonaĵo) por elĉerpi donitaĵojn. Evidentiĝis, ke d-ino Gertrude en la periodo 2005-09 prelegis 6 (!) fofojn, ŝi pertoprenis preskaŭ ĉiujn kunsidojn de nia E-societo, ŝi vizitis kvar kontinentojn de nia E-(ne nur)-mondo kaj ĉiam restis ege vigla E-istino. Pardonu min pro la sekeco de la informo, sed d-ino Novak estas imitinda persono!!! Mi sincere kondolencas...

—Araneo



## Woody Guthrie en Esperanto (3)

En la originala kanto Woody Guthrie menciis la societon 'C-I-O'. Mi ne povas klarigi la literojn sed mi supozas ke tio estas mallongigo por iu profesia unio aŭ sindikato ĉar Woody estas ja ankaŭ maldekstrulo. En mia versio mi prenis la mallongigon de la Hamburga Esperanto Societon H-E-S kiu ankaŭ bezonas membrojn :-)

— Tradukis Klaus Friese, Germanio

### Mi Aliĝos al Societo

*M: (I'm Gonna Join That One Big Union (Woody Guthrie))*

Dum la laboro kun miaj esperantaj kantotekstoj mi ja ofte aŭskultis la originalan muzikon de la kompaktdisko. Mi ne povis eviti ke ankaŭ mia kara edzino aŭskultis. Sed la melodion de tiu kanto ŝi tre ŝatis. Post mia klarigo ŝi miris pro la iomete malgaja enhavo. Verŝajne Woody Guthrie esprimis proprajn spertojn kaj sentojn. Mi komprenas ke per la paciĝema melodio oni povas ricevi konsolon.

Mi aliĝos al Societo  
Mi aliĝos, jes mi mem  
Neniu do aliĝos por mi  
Mi aliĝos Societon nur mi mem

Kaj vi frato vi aliĝu  
Ankaŭ vi, ja, jes vi mem  
Neniu do aliĝos por vi  
Vi aliĝos Societon nur vi mem

Se la vojo ŝtonabundas  
kaj al monto krutas pad'  
Ni kantados dum la marŝo  
Kaj ni gajnos societon kun sukces'

Kaj fratino vi aliĝu  
Ankaŭ vi, ja, jes vi mem  
Neniu do aliĝos por vi  
Vi aliĝos Societon nur vi mem

Vi aliĝu al Societo - Ho-E- So  
Vi aliĝu, jes vi mem  
Neniu do aliĝos por vi  
Vi aliĝos Societon nur vi mem

Se la vojo ŝtonabundas ŝtonabundas  
kaj al monto krutas pad'  
Ni kantados dum la marŝo  
Kaj ni gajnos societon kun sukces'

### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktoro Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
www.esperanto-chicago.org

### Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Vicprezidanto – Anonimulo  
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn  
828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library  
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL  
Kunvenoj komenciĝas  
je 7 p.t. en la Suda  
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

28an de Majo – Redaktora horo:  
100 numeroj de "Saluton!"

16an de Junio – Tradicia E-pikniko

23an de Julio – vespero omaĝe al  
Gertrude Novak

27an de Aŭgusto – UKdEo en  
Rejkjaviko